

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 6.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Podšbradova tř. 6. — Konto de la Pošta sparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

B. TITTL:

FARU VIAN DEVON.

La terura mondmilito kaŭzis en la venkitaj ŝtatoj ekonomian ruiniĝon, kiu en siaj konsekvencoj ĝis nun ne estas plene konstatebla. Kaj la ekonomia ruiniĝo estas komplikata per interna krizo politika, al kiu en ĉi tiuj ŝtatoj aliĝis intercivitanaj bataloj.

La Respubliko ĉeĥoslovaka, kie ĉiuj ĉeĥaj loĝantoj el ĉiuj sociaj klasoj kun senkompara entuziasmo laboras por starigi sian ŝtaton je moderna kaj demokrata bazo, eliris el la monda batalo sen pli gravaj internaj ekskuoj, kaj oni povas esperi, ke konforme al la klereco kaj amo de Ĉeĥoj al sia patrujo, tiu ĉi juna ŝtato eĉ en estonteco evitos la intercivitanajn batalojn, kiuj ekregis en ĉiuj najbaraj ŝtatoj.

Estas konate, ke la ĉefa kaŭzo de malĝojaj internaj cirkonstancoj en la venkobatitaj ŝtatoj estas la katastrofa ekonomia ciferpo kaj mizero, en kiujn ili estis ĵetitaj per la kelkajara batalado. En sia malesperiga situacio la Magiaroj kaj Germanoj turnas sin al ĉiuj flankoj kaj samtempe ilia nacia preso plendas, ke la Ĉeĥoslovaka respubliko ne plenumas siajn homajn devojn, ke ĝi ne helpas, kvankam ĝi povas al ili helpi. Kaj ŝajnas, ke en fremdlando oni komencas kredi al ĉi tiu plendo. Niaj amikoj sendis al ni el diversaj landoj tradukojn de artikoloj, en kiuj oni aludas ĉi tiun pekon de Ĉeĥoj. Kaj ĉefe la londona »The Times« kaŭze de tiu ĉi malbona informiteco faras malbonajn dedukojn pri niaj cirkonstancoj. Kaj ne estas mirinde, se ni ricevas petojn labori ĉe nia registaro por reformo. El la ricevitaĵ estas la plej atentinda la letero de so. Paŭl Balkanyi, sekretario de hungara Komitato por la lin-

B. TITTL:

KONEJTE SVOU POVINNOST.

Straŝnaŭ vlka svtov zpsobil v poraŝenych sttech hospodrsk rozvrat, kter ve svych dsledcch je dosud nedohledny. A rozvrat hospodrsk zhoršovn je krisi vnitropolitickou, jeŝ v tchto sttech vyvrcholila v obĉansk boje.

Republika Ĉeskoslovensk, kde vichni ĉešt obyvatele ze vsesh spoleĉenskych trd se s neporovnatelnm nadšenm chopili prce, aby svj stt vybudovali na podklad modernm a demokratickm. vyšla ze svtovho zpasu bez znaĉnjšch vnitrnch otres a moŝno doufat, ŝe pri vzdlanosti a lsce Ĉeĉ ke sv vlasti, pokroku a spravedlnosti, i v budoucnosti se tento mlad stt obejde bez vnitrnch obĉanskych boj, jimiŝ vseshny okoln stty jsou zachvceny.

Je znmo, ŝe hlavn priĉinou neutšennych vnitrnch pomr v poraŝenych sttech je katastrofln hospodrsk vyĉerpanost a bda, do kter uvrŝeny byly nkolikaletm vlĉenm. Ve sv zoufal situaci obrci se Maĉri a Nmci o pomoc na vseshny strany, a pri tom vseshen jejich tisk ŝaluje, ŝe republika ĉeskoslovensk nekon svych povinnost lidskych, ŝe jim nepomh, aĉ pomoci mŝe. A zd se, ŝe tto ŝalob poĉn se v cizin vřiti. Z rznych zem zaslali nm naši přatel (esperantist) překlady ĉasopiseckych ĉlnk, v nichŝ ĉin se nrŝky na tento hřich Ĉeĉ. Je to hlavn londnsk »The Times«, jenŝ jsa tmto zpsobem špatn informovn. ĉin o ns a naších pomrech nesprvn zvř. A nen pak divu, ŝe dochzeŝj ns připsy, abychom u naši vldy podnikli kroky k nprav. Z obdrŝenych je

ĈEĤOSLOVAKA LERNEJA SISTEMO.

G. Haberman, ministro por industrado kaj kulturo.*)

La nova respubliko komisiis min per la tasko, enkonduki ĝian lernejan sistemon en memstaran vivon. Volonte mi akceptis tiun taskon en la espero, ke per kunlaboro de rilataj lernejoj rondo, instruistoj kaj profesoroj, kiuj jam antaŭe faris sian laboron en lernejoj kvazaŭ en signo de ribelo kontraŭ la sklaviga sistemo, oni sukcesos trovi por nia lerneja sistemo novajn celojn, ĝin plenigi per nova spirito, kaj doni al ĝi novajn, sanajn, justajn kaj demokratiajn fundamentojn.

Per la politika revolucio estis en lernejo liberigita eĉ la instruisto. Ĉesis la ĝisnuna morale ne ebla stato, en kiu la instruisto diligente kleriganta per la rezultatoj de la moderna scienco, devis antaŭ siaj lernantoj paroli malveraĵojn. La instruisto mensogis, kaj se li ne mensogis, li estis persekutata en sia ekzisto. Mi zorgis, ke ĉiuj edukistoj ekkomprenu, ke ni eniris en periodon de vero, honesteco kaj justeco, kaj ke ili ĉiuj laŭ tiu ĉi realeco faru sian edukistan laboron. Kaj mi povas diri, ke eĉ pli granda parto de instruistoj kaj profesoroj mi trovis la fundon preparita.

Per nia liberiĝo estis liberigita eĉ nia lernejo. La spirito kaj senco de la eduka kaj instrua temoj devas esti senigita de flankaj kaj separataj influoj, la lerneja laboro devas esti regata de nova spirito, de spirito progresema. La lernejo devas ĉesi edukadon por mortinta, malbenita kaj entombigita estinteco, sed kontraŭe, ĝi devas labori por la estonteco. La lerneja junularo — jen la estonta civitanaro! Kaj la estonta civitano devas esti edukita sur la principoj de modernaj sciencaj konoj kaj spertoj, oni devas fiksi al li la senco por vero kaj bono, por civitana libereco kaj civitana egalrajto, kaj per la lernejo li ĉefe devas esti edukita por fariĝi faktoro de sociala justeco. Ni ne estos eĉ la celo, se ni starigos la lernejon sur fundamenton laikan. — Nia laboro devas esti daŭrigita: La estonta civitano devas fariĝi portanto de la kulturo en ĉiuj rilatoj.

*) Represo el »Nová Doba« kun permeso de so. ministro.

Ankaŭ la interna lerneja aranĝo devas esti modernigita. La ŝtato zorgos, ke oni eduku ĉiujn infanojn de la popolo en la samaj kondiĉoj. La diferenco de la propraĵo devas malaperi el la lernejoj, malriĉaj infanoj ne devas veni malsataj, malbone vestitaj en la lernejon, kaj ne devas suferi pro nesufiĉaj instruaj helpiloj. Sed la rimedo por tio ĉi ne estos ia almoza sistemo, kontraŭe, la lernejo jam en sia unua grado devas esti evidenta demokratio, kie ĉiuj infanoj estos egalrajtaj. La supera lerneja eduko ĉesos esti privilegio de posedaĵo, al talentohavaj infanoj oni devas doni okazon por atingi eĉ la plej altan edukon per subteno ŝtata: Nia lerneja sistemo devas prezenti fundamenton por nova karaktero de la bohema respublikano, koncia kaj justa. Ĉar la respubliko estos tia, kia estos ĝia popolo — kaj ĵus niaj lernejoj devas la popolon eduki. Ĝi devas zorgi pri tio, ke ĝi estu popolo, kiu scias plene sin valorigi en la ekonomia vivo, kaj kiu scias esti konstruanto, konservanto kaj defendanto de la respubliko. Ni estas nur malgranda parto de la mondo kaj ne multe helpus al ni la politika memstaro, se samtempe nia popolo ne estus sociale kaj kulture kapabla. La publiko, kaj precipe niaj rondoj laboristaj kaj socialistaj certe ekkomprenos niajn pensojn kaj scios ilin subteni. Ĉefe ni multon esperas de la enkonduko de okhora laborlaŭro; la laboristo povos sin pli multe dediĉi al tio, je kio li tiom sopiris — al la kulturaj interesoj, kaj sekve eĉ al la lernejo.

A. KUBŠOVA:

REMEMORO.

Mi estis tiam dekdu jara knabino, kiam mi entreprenis mian unuan vojaĝon el mia naskiĝturbo Plzeň, por travivi eksterhejme mian, iom pli longan libertempon eĉ mia onklo. Mi tre ĝojis vidi tiun regionon, kiu tre logis min, kvankam ĝi estis tute nekonnata al mi. Mi konis la ĉirkaŭaĵon de Domažlice sole el la rakontado de nia instruistino, kiu ĉiujare tie ĝuis sian libertempon.

Komence de la libertempo venis al mi nia onklo kaj forveturigis min kun si, kiam li ekaŭdis, kiom multe mi sopiras ekkoni ilian regionon. Ho, kiom feliĉa mi tiam estis!

Tuj la sekvantan tagon post nia alveno, gvidis min la onklo tra Domažlice, por ke mi bone konatiĝu kun la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Iun tagon ni ekskursis Babylonon. Estis tiam belega tago. Ni estis revenantaj nur kiam la suno subiradis jam la malproksiman horizonton.

Malvarmeta venteto ekblovigis kaj la vastega greno kampo troviĝanta dekstre de la ŝoseo disondiĝis. La aero vespera estis saturita de vegetaĵa odoro kaj aroma haldado de la sekiĝanta fojno, kuŝanta sur la proksima herbejo. El la naturo ekregis majesta silento, interrompita de tempo al tempo ie en malproksimo aŭdiĝanta hunda ekbojo. La zefiro ludetis kun la foliaro de arboj, kreskantaj ambaŭflanke de la ŝoseo, kies susuro kunfluigis en iun dolĉan flustradon. Ni iris gaje antaŭen, ĝuante en la animo tiun delikatan belecon kaj ravan ĉarmon de la somera vespero. La onklo kun evidenta plezuro ĉirkaŭrigardis la regionon, instruante min pri la naturo, kiun li tre amis. Ni malrapide paŝis laŭlonge de la ŝoseo, kiam subite ekaperis en la vastega horizonto kelke da slovakaj dratumistoj grandaj kaj malgranda. Mi ne vidis ilin pli frue, nur ĝis kiam la onklo mem atentigis min pri ili, ĉar tro fervore mi aŭskultis liajn afablajn kaj instruoplenajn vortojn.

Apenaŭ mi ekvidis ilin, mi ne povis ĝisatendi ilian alproksimiĝon, tiel mi ĝojis vidi ilin. La grupeto tiom pli ekinteresis min, ĉar ni dum longa tempo neniun renkontis. La dratumistoj venis al ni. Ili estis tre malriĉe vestitaj kaj trans iliaj ŝultroj pendis kelkaj ligaĵoj da diverspeca drato, lado kaj eĉ aliaj objektoj. Kun granda intereso mi observis ĉiujn, kaj unu el ili precipe intersis min. La ceteraj interbabilis, dume li senparole paŝis post ili. Li estis pala, evidente malsana, sed liaj viglaj kaj vivoplenaj okuloj rigardis nin afable. Li estis eble iom pli aĝa ol mi, havis longajn nigrajn harojn, pendantajn en bukloj ĝis la ŝultroj. Lia staturato estis gracia, vestita per kruda ĉemizo kaj malsupre disiritaj pantalonoj. Kompatindulo! Li estis tiel mizere vestita, kaj liaj piedoj, de sunbrulo tute nigraj kaj ĝis la sango disgratitaj, ne estis eĉ iomete ŝirmitaj. Liaj kunuloj pasis preter ni salutante: »Estu laŭdata Jesuo Kristo!« Li ekhaltis antaŭ ni, kun malgaja rigardo en la okuloj, kvazaŭ

li volus plendi al ni pri sia suferoplena vivo. Li demetis sian, tre eluzitan ĉapelon kaj salutinte sammaniere kiel liaj kunuloj, petis ion por manĝi. La tutan tagon li havis en la buŝo eĉ ne unu manĝopecon. Mi prezentis al li tranĉaĵon da pano kaj bulkon, ĝi estis ĉio, kio el nia provizo ankoraŭ restis, kaj lia osteca mano avido ekkaptis tion. Liaj okuloj ekbrilis kaj ŝajnis al mi, ke mi vidas en ili larmon. Li dankis ĝentile kaj kiam la onklo demandis lin de kie li estas li respondis: »El la Trenĉina komitato. Paĉjon kaj panjon mi havas ankaŭ tie.« La onklo donis al li ankoraŭ tri dudekheleraĵajn monerojn kun la rimarko, ne frandelspezi ilin. Li dankis kaj kun ĝojo en la okuloj li rapidis por atingi la kamaradojn.

Li foriris kaj la onklo ekparolis per sia agrabla voĉo pri la hejmlando de tiuj dratumistoj, pri la rokoriĉa Tatramontaro slovakaj, kiu ne povas elnutri siajn loĝantojn kaj tial ili estas devigataj kiel dratumistoj serĉi vivrimedojn en Bohemio kaj Moravio, kaj pri la senmezura subpremado, kiun ili devas suferi de la magiara superregado. »Kaj tiuj malriĉaj dratumistoj, tiuj Slovakoj estas niaj fraĵoj, ili estas branĉo de bohema nacio, malgraŭ tio ke ili apartenas al la alia duono de nia regno Aŭstria.« Tiel eble finis mia onklo sian instruoplenan klarigon pri Slovakoj, kiu eniĝis profunden en mian animon. »Kaj ŝajnas, ke tiu nia branĉo en la imundo de la magiara renegatigo baldaŭ pereos, ĉar ni, estante mem sub la jugo, ne havas tian potencon, ke ni povu en la nacia batalo helpi al ili.« La onklo eksilentis kaj kun nubiginta frunto li paŝis antaŭen.

Kvankam mi tiam ankoraŭ ne plene komprenis tiun nacian tragedion okazantan tie en Slovakio, en koro de Eŭropo, tamen la eldiritaj vortoj de mia onklo, kaŭzis al mi neforgeseblan impreson. De tiu tempo ĉiam, kiam mi ekvidis dratumiston, mi rememoris al mi la rakontadon de mia onklo, tie sur la ŝoseo apud Domažlice, kaj nun, kiam, danke al la potenco de nia justema amikaro, ni ĝisatendis ne nur nian propran memstaron, sed ankaŭ la kuniĝon, kun nia branĉo Slovaka, el koro mi bedaŭras, ke ankaŭ tiu bona, kaj de mi tiom amata animo ne ĝisvivis nian nacian renaskon.

B. TITL:

LA NECESA REFORMO.

La konsekvencoj devenintaj el bankro-tiĝo de malnova regado de Malbono kaj Perforto aperas ĉiuflanke: En ĉiuj fakoj de la homa celado vidiĝas energia peno je purigo, je ŝanĝo kaj perfektigo de tio, kio montriĝis esti malbona kaj neperfekta.

La volo reformi ĉion, kio estas reformebla kaj kio la reformon bezonas devas penetri eĉ en la tutmondan movadon esperantistan, ĉar nur en ĝia propra intereso kaj en intereso de la celoj al kiuj ĝi paŝas estas necese, ke ĝi eniru en la novan vojon de la homa vivo, kiel movado natura kaj celoscia.

Kaj la unua afero, kiun oni devas en nia movado reformi estas nia preso, nia gazearo, ĉefe la gazetoj naciaj. Antaŭ la milito fieriĝis la esperantistoj per vico da pli ol cent gazetoj, aperantaj en diversaj mondpartoj. Sed ni respondu sincere, kiom da ili havas per sia enhavo iun valoron por la mondo? Granda parto, ni eĉ diru pli granda parto reprezentas la animan malplenon de siaj redaktoroj, kaj pri tiu ĉi malagrabra vero ni devas en la nova tempo plene konsciiĝi. Por la estonteco ni devas akcepti la principon, ke redaktoro de nia gazeto povas esti ne nur persono, kiu nur pli aŭ malpli bone scias esperanton kaj konas la disvastiĝon de nia movado, sed persono, kiu krom ĉi tiuj fundamentaj postuloj konas ankaŭ nacian kaj politikan vivon, sopirojn kaj celojn de sia nacio.

Literaturo, arto kaj eĉ ĵurnalismo estas bildo kaj spegulo de la nacio, el kiu ĝi devenis kaj tial ankaŭ la esperantaj gazetoj devas stari en servoj de sia nacio. Tiu ĉi fundamenta bezono restis ĝis nun en niaj naciaj esp. gazetoj tute sen atento, kaj tial eraris tiu, kiu en opinio, ke li konatiĝos kun la kulturo de rilata nacio, abonis polan, hungaran aŭ alian esp. gazeton. Ne, ĉi tiun seriozan postulon niaj gazetoj ne povas plenumi, por tiu celo vi devas lerni la lingvon nacian kaj aboni gazeton en lingvo nacia. En esperantaj gazetoj vi povas legi detalajn raportojn, ke en iu loko iu entuziasmoplena samideano heroe portis altenlevitan esp. flagon tra la urbo kaj ke »tiu ĉi bonega propagando vekis eksterordinaran intereson por nia afero«,^{*} aŭ

malbonajn versojn de senseca enhavo, pli aŭ malplibonajn tradukojn el nekonataj aŭtoroj, enigmojn kaj longajn redakciajn respondojn al unuopaj personoj, kaj kiujn estas devigataj legi ĉiuj legantoj, sed pri kultura vivo kaj celado de la nacio niaj gazetoj alportas eĉ ne unu linion. Kaj ni ankoraŭ miras, se iu proklamis, ke esperanto estas infana ludilo kaj ke ĝi ne havas praktikan valoron por la vivo.

Kian grandegan laboron povus fari niaj gazetoj por la tutmonda kulturo kaj por la kulturo de sia nacio, se ili akomodigis al la praktikaj bezonoj de la mondo! Kaj kian gravan helpon ili povus prezenti al la nacia ĵurnalismo se oni povus ĉerpi el ili la raportojn kulturaajn, kiuj estas valoraj por ĉiu klera homo.

La esperantista gazetismo povus reprezenti gravan potencon — se ĝi nur sciuss ĝin uzi.

En la nova tempo la esperantaj gazetoj devas pagi sian ŝuldon al la tutmonda kulturo!

ALVOKO AL LA ESPERANTISTARO.

Genevo, la 1. januaro 1919.

Esperantistoj!

Fine ĉesis la interpopola batalado, kiu dum pli ol kvar longaj jaroj nedireble suferigis la koron de la Esperantistoj. La hela lumo de la paco ekaperas ĉe la horizonto; nova vivo komenciĝas!

En la daŭro de la lastaj monatoj grandegaj okazintaĵoj plenumiĝis kun fulma rapideco. Malnovaj imperioj falis, popoloj emancipiĝis, kadukaj idealoj estas venkitaj, ĉio renoviĝas kaj transformiĝas antaŭ niaj okuloj mirigataj. Kia ordo elkreskos el la nun interbatalantaj fortoj, neĵu jam povos antaŭdiri kun plena certeco, sed ĉiu ja sentas, ke la estonto apartenas al la ideoj de libereco, de justeco, de interpopola kompreno, kiuj fine traboras la glacian tavolon de la homaj antaŭjuĝoj kaj nun nerezisteble sin trudas al la mondo trompita de la malnoviĝintaj sistemoj de perforto.

Aparte korporema por ni, Esperantistoj, estas la hodiaŭa momento. La triumfo de la demokratiaj ideoj en la mondo kiel ankaŭ la teruraj spertoj de la milito lasas esperi en proksima tempo, la fondon de tiu Ligo de la Nacio, kiu ostis prirevita de tiom da noblaj pensuloj. Kun entuziasma koro ni ĝin antaŭsalutas, kaj ĉiu el ni laŭ sia povo certe helpos al tio, ke ĝi venku ĉiujn malfacilaĵojn. Tamen, kiu havas kelkan sperton pri la problemoj de la internacia vivo, tiu klare sentas, ke la starigo de daŭra paca ordo dependas ne sole de pli aŭ malpli taŭgaj

leĝoj kaj de pli aŭ malpli juste desegnitaj landlimoj, sed antaŭ ĉio de la ebleco de paca kunlaboro inter la popoloj, de ilia reciproka kompreno kaj tolero. Kiel Esperantistoj ni scias, ke el la diversaj rimedoj celantaj la plibonigon de la interpopolaj rilatoj, neniu estas pli efika ol la disvastigo de nia lingvo, dank' al kiu falos por ĉiam la miljaraj baroj, kiuj apartigas la diversnaciajn bonvolulojn, kaj plirapidigos la progresoj de tuthomara civilizo. Ni konscias, ke nun pli ol iam Esperanto estas necesega al la mondo, kies estontan unuecon ĝi esprimas. Ke aliparte ĝi estas ludonta gravan rolon en la praktikaj internaciaj rilatoj de la ĉiutaga vivo, pri tio ni ne bezonas insisti. Ni do pro multaj kaŭzoj rajtas rigardi al la estonto kun espero kaj kuraĝo.

Tra la tuta mondo oni nun klopodas restarigi tion, kion detruis aŭ difektis la milito. Ankaŭ por ni, Esperantistoj, venis la momento por rekonstrui nian aferon kaj rekomenci nian agadon kun duobligita fervoro. Dum kvar jaroj nia paca laboro estis grave malhelpata. Multaj samideanoj estis vokataj al la batalkampo, en granda nombro de lokoj la Esperantistaj organizaĵoj perĉeis aŭ nur vivetis, la internaciaj komunikoj estis apenaŭ eblaj. Ke spite tiom da malfavoraj kondiĉoj, nia afero ne mortis, sed, malsimile al preskaŭ ĉiuj aliaj internaciaj movadoj, venke eltenis kontraŭ la krizo, estas brila pruvo pri ĝia vivforto. Fieraj ni povas esti pri tiu rezultato. Ĝi tamen ne trompu nin! De nun ni devas ne nur ekzisti, sed **progresi** kaj por tio energie streĉi ĉiujn fortojn niajn. Ne facila ja estos la unua postmilita periodo, sed kun obstino kaj pacienco ni venkos la barojn, se ĉiu agas kun tiu sama fajra fervoro, kiu regis ĉe niaj unuaj pioniroj, kaj estas nun nepre kondiĉo de sukceso.

*

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaŭzitaj de la milito, daŭrigis funkcii la Centra Oficejo de UEA, sola internacia centro de Esperatismo, kaj regule aperis la gazeto «*Esperanto*». Tiuj rezultatoj estis eblaj nur dank' al gravaj oferoj de laboro kaj mono, kaj dank' al la subteno de kelkaj centoj da fidelaj samideanoj. Pruvinte sian vivpovon dum la pasintaj malfacilaj jaroj, UEA rajtas esperi, ke la Esperantistaro konfidos al ĝi por la ĝustatempa prizorgado de la komunaj taskoj kaj por la rekonstruado de la internaciaj aranĝoj.

La cirkonstancoj ne estas ankoraŭ tiaj, ke detala laborprogramo povu esti strigata. Sed la Centra Oficejo de UEA diligente studas la diversajn postmilitajn problemojn, kaj siatempe konigos siajn intencojn kaj planojn. Dezirante labori en plena interkonsento kun la naciaj Esperantistaj societoj kaj informiĝi pri iliaj opinioj kaj deziroj koncerne la estontajn taskojn, ĝi aranĝis ĉe tiuj organizaĵoj enketon, kiu helpos al la starigo de komuna laborplano konforma al la nuntempaj bezonoj. Tuj kiam la militpartoprenintoj estos revenintaj hejmen, ĝi reorganizos la servojn de la Asocio, sin adaptante al la ekzistantaj eblaĵoj, kaj klopodos elekti delegitojn en kiel eble plej multaj lokoj. Kiam tiu reorganizo estos sufiĉe progresinta, ĝi ree eldonos la Jarlibron, kiu antaŭe tiom helpis

al la uzado de Esperanto, kaj alpaŝos al aliaj ĝeneralaj propagandaj kaj praktikaj laboroj nun pristudataj.

Certe neniam mankos la plenumotaj taskoj. Sed ni rememoru, ke la plej belaj projektoj kaj la plej sagacaj iniciatoj estos vanaj, se ĉiuj Esperantistoj ne kunlaboros al ilia realigo kun fervoro kaj seriozeco. Ne sole la gvidantoj de la movado devas agi, sed ĉiu, eĉ la plej humila samideano povas helpi al la komuna sukceso, aktive interesigante al la vivo de nia afero, aligante al UEA kaj al la lokaj kaj naciaj organizaĵoj, disvastigante Esperanton en sia rondo. Precipe urĝaj estas la varbado de novaj Esperantistoj kaj, en ĉiu loko, la reorganizado de la Esperantista grupo, kiu estas la necesa fundamento por efika komuna agado. La milito ne malgrandigis la sukcesancojn de Esperanto, sed kontraŭe, pro la kreskanta interesiĝo al internaciaj problemoj, kiu de ĝi rezultis, ĝi igis nian taskon pli facila kaj nian penadon pli favore atentata. Ni do sciu profiti la novajn cirkonstancojn, kaj sentime iru antaŭen.

La batalo, kiun ni rekomencas, kondukos al la sukceso, nur se ni ĉiuj laboros en plena unueco kaj konkordo.

Por kunligi la individuajn klopodojn kaj direkti ilin al trafa agado, ekzistas diversaj Esperantistaj organizaĵoj, lokaj, naciaj, internacia. Oni energie subtenu, morale kaj materie, tiujn, kies vivkapablecon kaj utilecon montris kelk-jara sperto, sed oni nepre evitu senprudente krei aŭ restarigi entreprenojn, kiuj ne respondus al ĝenerale sentata bezono kaj ne havus sufiĉajn vivrimedojn. Nia antaŭmilita agado ofte estis malfaciligita de disputoj pri organizaj demandoj, kaj devenis de tio, ke oni estis senpripense farinta tro komplikajn aŭ nenecesajn aranĝojn. Tiaj eraroj ne estu ripetataj. Nia organizo devas esti simpla. Ĉio necesa en tiu rilato jam ekzistas; sufiĉas ĝin plibonigi kaj harmonie kunordigi.

En la komenco de tiu nova periodo, estas ankaŭ necese, ke estu flanken metataj ĉiuj personaj demandoj kaj disputoj. Kiel diris nia karmemora Majstro en sia lasta kongresparolado: «Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aeron pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.» For la senutilaj personaj disputoj! For intrigemo kaj klaĉemo! La nova tempo postulas antaŭ ĉio seriozajn laboremulojn, bonajn konstruantojn, sindonemajn pionirojn.

Pretigu vin al la laboro, karaj samideanoj, kaj kuraĝe antaŭen, por la baldaŭa triumfo de nia kara lingvo kaj la starigo de pli bona homaro. Vivu Esperanto!

En la nomo de UEA,

La Direktoro:

H. Hodler.

La Vicdirektoro:

Ed. Stettler.

La morala devo de ĉiu esperantisto estas kunlabori en la senco de supre priskribitaj ideoj!
La Progreso



Esperantista memoraĵo je malaperinta Aŭstria monarkio: bildoj el la IV. (lasta) Tutaŭstria esp. kongreso en 1914 en Františkovy Lázně (Franzensbad). □



La bildoj prezentas monumenton de Esperanto. Sur la unua bildo estas aro de esperantistoj ĉefe el Plzeň. (Laŭ fotografio de so. Pech. □ Plzeň). □



PORTU LA STELON!

Stelon, stelon, verdan stelon,
Fratoj, portu kun kuraĝ'!
Kaj en lumo de l' espero
Ĉiam brilu la vizaĝ'!

Malamikaj kontraŭdiroj,
Fratoj, ne timigu vin!
Mokoj, ridoj kaj ĉikanoj
En batal' fortigu nin!

Por la venk' de l' Esperanto
Fratoj, ho! klopu du vi!
Dank' kaj beno de l' homaro
Estu rekompenc' al ni!

Stelon, stelon, verdan stelon
Fratoj, portu kun kuraĝ'!
Kaj en lumo de l' espero
Ĉiam brilu la vizaĝ'!

P. Francisko Meŝtan, Krems.

Jeŝa:

ANTAŬEN, SAMIDEANOJ!

Espereble rekomencos pli vigla propagando inter bohemiaj esperantistoj... Espereble, mi diras, ĉar mi jam kelkafoje multe esperis kaj estis trompita. Sed nun, fine, la nova jaro donos al ni novan forton kaj se ĝi ne troviĝas en ni mem, mi opinias, ke la idistoj, kiuj anoncis antaŭ nelonge, ke ili rekomencos propagandon, fortigos kaj revigligos nin. Do, ni antaŭ ĉio esperu! Por povi publike diligente labori, ni bezonas bonajn batalantojn, ĉu ne? Sed oni scias, ke la batalantoj, kiuj pro la samia »sankta celo« laboras, povas havi tute malsamajn ecojn. Certe neniu kontraŭstaros min en la certigo, ke ni antaŭ ĉio bezonas nur bonajn batalantojn kaj tia ne estas homo, predikanta »tutmondan fratecon« kaj samtempe konservanta malamon inter vicoj de siaj samnacionoj. Ni rivizu niajn vicojn, ni pripensu jam niajn estontajn taskojn, ni kunvenu, ni kunvenadu, ni ŝarĝu la redakcion de nia »Progreso« per sciigoj kaj publikigitaj proponoj, ni kritikitu ni laboru, ni frate helpu unu la alian vivu, ni iru antaŭen!

D-ro Stanislav Schulhoť:

GEOGRAFIAJ KAJ ETNOGRAFIAJ NOTOJ PRI ĈEĤOSLAVA RESPUBLIKO.

En la decembra numero de la gazeto Esperanto estis publikigita bela artikolo pri geografiaj nomoj kaj la redakcio anoncas, ke ĝi publikos en la proksima numero tabelon de la ĉefaj landnomoj al kiu, ĝis la Esperantistaro alie decidis, de januaro 1919 konformiĝos la gazeto.

Ne atendante la anoncitan januaran numeron mi provas en ĉi tiu artikolo pri-trakti la geografiajn kaj etnografiajn nomojn, kiuj plejparte rilatas nin, membrojn de nia nova ĉeĥoslava respubliko. Kaj tuj mi komencas kun la nomo Ĉeĥoslavo, kvankam en lastaj jaroj oni ĉe ni komencis ofte uzadi la vorton Ĉeĥoslovakoj. La formo Ĉeĥoslavo estis ĉe ni kaj en fremdlandaj verkoj pri nia nacio ĉiam uzata kaj ne estas kaŭzo, kial per nova formo Ĉeĥoslovakoj devenis el la fakto, ke Ĉeĥoj kaj slovakoj, kiuj estas ambaŭ gentoj apartenantaj al Ĉeĥoslava nacio kune bataladis

kontraŭ la iama aŭstrohungara monarĥio kaj certe ĝi estis formita nur pro tio, ĉar la Ĉeĥoj apartenis al Aŭstrio dume la Slovakoj al Hungario. Se oni volis per ĉi tiu apartigo montri, ke ambau ĉeĥoslavaĵoj (Ĉeĥoj kaj Slovakoj) partoprenis en la milito kontraŭ la monarĥio, tiam se oni volus agi juste, oni devus nomi ankaŭ aliajn Ĉeĥoslavaĵojn, ekzemple, Valaĥojn kaj Hanakojn! El ĉi tio sekvas, ke ankaŭ estonte restos la ĵusta formo Ĉeĥoslavo, al kiu nacio apartenas ne nur Ĉeĥoj kaj Slovakoj, sed ankaŭ aliaj gentoj, kiuj ankaŭ posedas propran ĉeĥoslavan dialekton, kvankam ne literaturon kaj diferenciĝas per propraj kutimoj kaj kostumoj. Sekve nia respubliko estos ĉeĥoslava kaj la nacio kiu ĝin en pasinteco fondis kaj nun rekonstruis estas Ĉeĥoslavo.

Nia respubliko konsistas kaj versimile ankaŭ pro administraj kaŭzoj konsistos el tri ĉefaj partoj: Bohemio, Moravio kaj Slovenio.

Estu al mi permesate, ke mi tuj klarigu ĉi tiujn por la orelo de fundamentistoj iom reforme sonantajn formojn speciale ĉe la vorto Bohemio. Ĝis nun oni uzis ĝenerale la formon Bohemujo, sed ĉi tiu formo sonis iom sovaĝe kompare kun la internacie konata formo Bohemia. La saman sovaĝecon oni sentadis ankaŭ ĉe aliaj landnomoj, kaj pro tio la lingva komitato akceptis en la jaro 1910 per granda plimulto la proponon, ke por la landnomoj, kie ĝi estas nepre necesa, oni enkonduku anstataŭ la malnova formo ujo, novan formon io — sekve Bohemio. Cetere oni de ĉiam neadis la formon Moravio, kaj nun alvenas la tria, nia Slovenio, kiu kompreneble estas io tute alia ol Slavonio (Slavonie) kaj Slovinio (Slovinsko) ambaŭ apartenantaj nun al Jugoslavio.

En Bohemio loĝas du gentoj, Ĉeĥoj, aŭ Ĉeĥoslavo kaj Germanoj. Ambaŭ kune estas Bohemoj, simile kiel en Bohemio estas bohemiaj riveroj, bohemiaj montoj, troviĝas bohemiaj grenatoj, sendepende se ili estas aŭ troviĝas en teritorio ĉeĥa aŭ germana. Esperantista formo Bohemiano ne diras pli ol nia simpla Bohemo, sekve la lasta estas preferinda. Eraro estas kompreni sub la nomo Bohemo nur la genton ĉeĥan resp. ĉeĥoslavan, kiel tre ofte faras la Germanoj skribante gramatikojn »der böhmischen Sprache«. Ne ekzistas bohema lingvo kaj sekve ankaŭ mi erare skribis

foje en Marto pri historio de Esperanto inter Bohemslavoj, kaj same tradukante el bohema lingvo. Guste mi devus skribi Esperanto inter Ĉeĥoslavoj, traduko el ĉeĥoslava lingvo.

Simile estas en Slovenio. Tie krom Slovakoj, kiuj apartenas al Ĉeĥoslava nacio, loĝas Madjaroj (Magiaroj), Germanoj, Rusoj kaj nemultaj Poloj. Ili ĉiuj estas Slovenoj, kvankam ili ne ĉesas esti Slovakoj, Germanoj, k. t. p. La radiko Sloven' estas kiel la radiko Bohem' radiko pure geografia, kaj neniel etnografia.

Malpli simpla estas la terminologio por Moravio, inkluzive Silezio, kiuj ambaŭ landoj estos eble kunigitaj en unu administran unuon. Tie fluas la rivero Morava, kaj sekve la tieaj loĝantoj, Ĉeĥoj, Slovakoj, Hanakoj, Valaĥoj (kune Ĉeĥoslavoj), Germanoj kaj Poloj ne povas esti nomataj Moravoj, ankaŭ ne Moravanoj (anoj de rivero Morava), sed nur Moravianoj. La loĝantoj de nuna Silezio (Ĉeĥoslavoj, Germanoj kaj Poloj) povas uzi ankaŭ la komunan nomon Silezianoj, se ili volus montri per ĉi tiu formo sian aparton al nomita teritorio. La komuna nomo por ĉiuj loĝantoj de ĉeĥoslava respubliko ankaŭ ne ekzistas, kvankam estus eble uzi la formon Bohemianoj, ĉar la lando Bohemio estas efektiva patrino de la nuna respubliko. La radiko Bohem' estas krom tio radiko tute neŭtrala, ĉar ĝi el la nomo de unuaj praloĝantoj, Bojoj, kiuj estis de kelta deveno, simile kiel la unuaj loĝantoj de Belgio (Vlamoj, Valonoj kaj Germanoj) estas kune nomataj Belgoj, kiu nomo ankaŭ devenas el la nomo de keltaj praloĝantoj, nomitaj Belgoj.

Resume ĉiuj loĝantoj de nia ĉeĥoslava respubliko povus en Esperanto esti nomataj Bohemianoj; se oni volas precize difini el kiu lando, tiam oni povas aldoni Bohemo, Moraviano kaj Sloveno, kaj fine se oni volas akcenti ankaŭ la nacian aŭ gentan apartenon, tiam oni uzos la nomon Ĉeĥo aŭ Slovako aŭ Germano, Madjaro, Ruso kaj Polo. Aliaj dialektoj kaj regionaj nomoj (kiel Hanakoj, Valaĥoj k. t. p.) havas nur lokan, internan kaj neniel la fremdan mondon tuŝantan signifon. Kompreneble mi aldonas, ke ĉi tiuj notoj estas nur miaj personaj proponoj kaj tre volonte mi submetiĝos, se la decidoj de miaj samlandanoj estos aliaj. Sed nur ni devos

la demandon solvi kaj ne lasi la solvon al eksterlandaj esperantistoj, kiuj ne povas koni niajn geografiajn kaj etnografiajn rilatojn.

B. Tittl:

PRI LA GEOGRAFIAJ NOMOJ.

S-o. dro. Schulhof mencias en sia artikolo la studion de la redakcio de Esperanto en kiu oni prave plendas pro neunuco en la derivado de la landnomoj en esperanta lingvo. Oni ekzemple uzas: Germanujo, Germanlando kaj eĉ Germanio, kaj estas klare, ke simila diverseco kaŭzas konfuzon en nia literaturo. En tiu studo oni proponas forigon de la finiĝo -uj, kiu cetere estas ankaŭ uzata por objektoj, eĉ la kunmetaĵon kun -lando, kaj anstataŭi ilin per unueca sufikso -io, kiun en la jaro 1910. aprobis nia Lingva komitato. Kaj la proponon tuj sekvas ago: en la januara numero de la supre citita gazeto oni jam uzas en la derivado de la landnomoj sole la sufikson -io. Mi konfesas, ke en ĉi tiu punkto mi tute konsentas kun la redakcio de Esperanto, kaj tial ankaŭ mi estonte uzados la sufikson -io ĉe la landnomoj.

Pri la artikolo de s-o. dro. Schulhof mi povas diri, ke en kelkaj punktoj mi ne konsentas kun li. So. Sch. diras, ke estas eraro kompreni sub la nomo Bohemo sole la genton ĉeĥan. Mi kontraŭe opinias, ke tiu ĉi difino estas tute korekta, rigardante al la esprimoj uzataj en ĉeĥa lingvo, kie la nacio estas nomata Ĉeĥ, kaj la lando de ĝi loĝata Ĉeĥy (elp. Ĉeĥ, Ĉeĥi). Se ni tradukas ĉi tiujn nomojn en esperanton, ni ricevas: Bohemo, Bohemio. Se ni penos internaciigi la naciajn sonojn, tiam en esperanto ĉiu nia samnacio estas nomata Ĉeĥo kaj nia tuta lando Ĉeĥio. Mi diras tuta lando, laŭ la geografia koncepto, t. e. eĉ kun la teritorio laĝata de Germanoj, same kiel mi sub la koncepto Francio komprenas eĉ la francan ŝtatan teritorion loĝatan de Italoj. Bohemo kaj Ĉeĥo estas du nomoj de la sama nacio, kaj Bohemio kaj Ĉeĥio estas du nomoj de la sama lando. Bohemo, Bohemio estas formoj pli internaciaj. Ni ĉeĥaj esperantistoj jam antaŭ la milito penis enkonduki en esperanton niajn naciajn nomojn kaj ni protestadis, se en esperantaj gazetoj oni uzadis anstataŭ Praha - Prag, anstataŭ Plzeň -

Pilsen, ktp. Certe ankaŭ nun ni preferos uzi en esperanto la formojn Ĉeĥo kaj Ĉeĥio, anstataŭ Bohemo - Bohemio. S-on. Schulhof erarigas la fakto, ke en Ĉeĥio loĝas ankaŭ Germanoj kaj erare li opinias, ke sub la nomo »Bohemo« oni devas kompreni Ĉeĥon eĉ Germanon loĝantan en Bohemio. Tute ne, Germano estas Germano, kaj kiel mi supre klarigis, Ĉeĥo kaj Bohemo estas la sama koncepto. Germano loĝanta en Bohemio (aŭ Ĉeĥio) estas Bohemiano (aŭ Ĉeĥiano) sed ne Bohemo, same kiel Italo loĝanta en Francio estas Franciano, sed ne Franco.

Pri la esperanta nomo de nia respubliko ne povas esti dubo. En la ĉefaj lingvoj naciaj estas por ĝi preskaŭ la sama nomo, kiu tute konformiĝas en la radiko »ĉeĥo-slovak«, kiun oni devas akcepti ankaŭ en esperanton. Ni do povas nomi nian ŝtaton Ĉeĥoslovaka respubliko, aŭ Ĉeĥoslovakio sed ne alie.

J. S. MACHAR:

BOHEMOJ DUM LA TUTMONDA MILITO.

La historio havas sian logikon kaj siajn signalojn. Ĝi neniigas ĉiun formon, kiun ĝi estas kreinta tuj, kiam ĝia tasko estas plenumita se ĝi ne scias anstataŭi la perditan sencon de sia vivo per alia. Kaj ĝian detruigon anoncas simptomoj, per kiuj sin anoncigas mortminaca malsano en la homa korpo: per laciĝo de intelekto, per ulceroj, ekzantemoj, impotento de membroj.

La senco de iama Aŭstrio estis grupigi malgrandajn naciojn en la mezo de Eŭropo kontraŭ la turka danĝero — tuj kiam Turkujo fariĝis senpotenca, malaperis tiu ĉi raison d'être kaj Aŭstrio sekve estis devonta fariĝi por siaj nacioj hejmo justa kaj amata. Ne komprenis tion la dinastio, nek Germanoj, nek Magiaroj — la formo ne havis vivsenton, kaj multaj nacioj deziregis veni eksteren, for de ĝi. Ekŝveladis ulceroj kaj ekzantemoj: foruma korupcio, libermora karteremo, senhonta protektado, malzorgema administrado, ĉirkaurado de leĝoj, cinismo kun masko de justeco, vaporiĝinta vortmoralo — kaj super ĉio la dinastio kadukula, degenerita, nekultura, avara, ĝuema, timegula kaj bigota. Aŭstrio estis en disfalo jam antaŭ la tutmonda milito, dum kiu ĝi nur maturiĝis al falo. Ĝi komencis la militon kun atakforteco, kvazaŭ en tiu malnova korpo estus ekvivinta ia regeneracio de fortoj — sed tio

estis nura febro, kiu kreis rozojn sur veliĝintaj vangoj kaj ekflamigis malklarajn okulojn; kiu observis ĝin laŭ vidpunkto de la historio, tiu ne povis erari: ĝia lasta horo proksimiĝis, maljunuleto kuŝiĝis kaj nortaco.

Kaj nia momento estis ĉi tie. Bohemoj elsentis ĝin unuaj kaj sciis, ke ni post tricent jaroj faros la bilancon. En popolo nome vivis tricentjara doloro de maljustaĵoj kaj humiligoj, kaj tricentjara dezirego esti denove mastro en sia patrujo. En la popolo estis la voĉo de la sango, kiu ekkriis: nia momento estis veninta!

Popolo nia iris tutmondan militon... Ila sprite observanta generalo aŭstria diris pri la Bohemoj: kiam ajn ni eĉ malmulte malsukcesas sur batalejo, ili ĝojas kiel infanoj. — Kaj ili ne nur ĝojis: venis la tempo, kiam ili povis agi. Ili transiradis tien, kien la koro ilin tiris — al malamikoj de Aŭstrio, aŭ forĵetadis armilojn kaj forkuradis, aŭ malsekretigis ĉion, kion ili sciis. Kie staris boh. soldatoj, la aŭstria fronto ne estis sekura. Kaj la naivega Franz Joseph disligis la 28-an regimenton en la opinio, ke li brulstampas malhonoron de ŝtatperfido al bohema popolo. Kaj niaj knaboj daŭrigis gaje la perfidaron; do la militadministrado prenis la malan rimedon: por ke la malamikoj de Aŭstrio ne speku kun senordo, kaj nefidindeco de la armeo, ĝi komencis laudi en militraportoj nur individuajn korpusojn kaj tre ofte — bohe najn regimentojn.

Ĉio mane — la historio havas sian logikon kaj siajn signalojn. Tiuj inteligentuloj, kiuj komprenis la logikon kaj la signalojn, ankaŭ laboris. Unu ne sciis pri la alia; se du same kredantaj renkontiĝis, ili palpadis siajn animojn per vortetoj kaj signoj, ĉar alie ne estis eble. Mortanta bestio aŭstria rigardis per okuloj de policistoj kaj spionoj al ĉiuj flankoj, kaj frapis, pistis, mordis, gratis kaj premsufokis senkomplete.

Kaj tial al nia inteligentularo ne estis alia helpo ol perfidi. Perfido en ĉio kaj ĉie. »Jen la sklavo — l'arnilo de sklavo la perfido estas...« mi citis milfoje dum la milito jenan terure pravan version de Mickiewicz.

Oni perfidadis ĉion: movadojn de armeo, transportojn de municio, kapricojn de la kortego, leterojn de ministroj, rezervajajn ordonojn militajn, elauŝkultitajn interparolojn telefonajn, borsan situacion, eĉ tutaĵajn paĝojn el notlibroj de aŭstria ministroj. Kaj tiuj ĉi aferoj iris trans la limoj de skribitaj originale aŭ per ĉifroj en dratoj de pluvombroj, en librobindaĵoj, en man-

teniloj de bastonoj, en butonoj, aŭ skribitaj per nevidebla inko sur silka subjupe de operkantistino, aŭ muntitaj en maŝinpistoj. Kontraŭ la aŭstria bestio ĉio estis permesita kaj kio ajn celis kontraŭ ĝi, ĉio estis sanktigita. Ĝi furiozis, estas vero kaj malfaciligis la laboron, kiel ĝi povis kaj sciis. Ĝi razis hararon al virinoj pasantaj la limojn kaj frotegis iliajn kraniojn ĝis sango, por ke aperu nevidebla skribo, ĝi frakasis metalmonerojn de botoj de pasaĝeroj, nu, iam ĝi trovis ion, oftege ne — gaja vivo tio estis!

Masaryk kaj ceteraj forveturis ĝustatempe eksterlandon kaj hejme oni perfidis, kie kaj kion oni povis — kaj ju pli la bestio furiozis, des pli multiĝis la »patrujperfiduloj«. Bohemaj kuracistoj komencis praktiki nombregaj operaciojn de cekumoj, malsaniĝantoj neniam povis resaniĝi, hospitaloj estis ŝtopplenitaj, en klinikoj estis retenataj kaj observataj soldatoj, kies malsanoj estis misteraj kaj nepenetreblaj, en stratoj de Praha svarmis kripluloj kun unu, du bastonoj, al kiuj militkuracistoj absolute ne povis helpi — establoj reklamadis homojn el la militservo, senkonsidere ĉu tio estus necese, reklamis urb — kaj vilaĝestroj, fabrikoj — reklamis la tuta mondo.

Kiam la ŝtato bezonis kaj rekviziiciis metalojn — ĝi ricevis plej malmulte el Bohemio. Eĉ, mi konas homon, kiu amasigadis bronz- kaj nikelmonerojn kaj sukcesis ilin kolekti por ke ili »al tiu malbenita Aŭstrio ne venu en ungegojn!« La militaj ŝtatpruntoj ne estis subskribiitaj, kaj kiu tamen devis, tiu klopodis senposediĝi de la »multvaloraj« paperoj; oni ne aĉetis bildojn de l'imperiestro, oni rifuzis ĉiujn entreprenojn de ministerio celantajn al diversaj »zorgoj« — unuvorte, al ĉio, kion Aŭstrio volis de siaj nacioj, respondis nia popolo konkorde: ne!

Kaj tiu »ne« sonis senĉese kaj persiste, eĉ kiam »k. k.« armeoj venkadis sur baltalejoj plej grandioze — ĉiam ne, ne, ne.

En jaro 1916 diris al mi Preminger, unu el justecaj ekzekutistoj de Aŭstrio:

— Vi Bohemoj celas foriĝi de Aŭstrio — kaj tio estas patrujperfidulo!

— Sed tiam ordonu konstrui ĉirkaŭ la tuta Bohemio, Moravio kaj parto de Silezio altan muron, en ĝi faru unu pordegon, ĉe la pordego starigu soldatojn kun bajonetoj, super la pordego metu surskribon: K. k. Kriminal — kaj vi havas ĉiujn patrujperfidulojn kunigite, mi respondis.

— Kaj kiel vi nomas tion, kion oni faras ĉe vi?

— Pasiva revolucio, se vi volas!

Tiu ĉi termino evidente akiris lian plaĉon, ĉar li uzis ĝin en sia akuzo kontraŭ Dro Kramář kaj kunuloj.

Pasiva revolucio — jes, kaj ni venkis per ĝi.

El »Nár. Listy« tradukis Kar. Fiala.

KULTURO.

Profesoro Ernesto Denis, la eminenta franca historiisto, entuziasma kaj ofera amiko de ĉeĥa nacio alvenis en la jaro 1872 la unuan fojon en Praha por resti tie dum tri jaroj. Dum tiu tempo li per helpo de Jaroslav Vrchlický fervore lernis ĉeĥan lingvon kaj Palacký, Tomek kaj Kalousek instruis lin detale pri la historio de Bohemio. La ĉeĥa nacio ŝuldas al prof. Denis ĉiaman dankemon por la laboro, kiun li per siaj verkoj faris por ĝi: En la jaro 1878 li aperigis la unuan verkon pri la Ĉeĥoj »Huss et la guerre de Hussites« (Hus kaj la milito de Husanoj), En 1890 aperis »Fin de l' independance Boheme« (Fino de bohema memstara), kaj en la jaro 1903 la ĉefverko »La Boheme depuis la Montagne Blanche« (Bohemujo post la batalo sur la Blanka Monto). Sennombraj estas la artikoloj, kiujn aperigis prof. Denis en francaj ĵurnaloj kaj eĉ dum la mondmilito li laboris por nia nacio, estante helpanto kaj konsilanto al nia prof. Masaryk. — Okaze de lia 60 jara naskiĝa jubileo la 3. jan. 1919. aperis en ĉiuj ĉeĥoslovakaj gazetoj longaj artikoloj pri la signifoplena laboro de la jubilanto kiuj ĉiuj kuniĝis en la sincera deziro, ke prof. Denis longe vivu por la ĉeĥa nacio.

Menciinda jubileo. En bona memoro estas la jaro 1908, kiam venis en Francion du Amerikanoj Orville kaj Wilbur Wright el Dayton, kiuj de la jaro 1903 faris sekretajn provojn en flugado en Kitty Hawke, ili venis ĉi tien por daŭrigi siajn eksperimentojn. Tiam akceptis ilin Francio — gastama kiel ĉiam.

Post dek jaroj, kiuj en la aviado signifas grandegan progreson estis la memorindaj tagoj festitaj de la »Franco-Amerika Unio« sur la plataĵo apud Mons, kie Wright faris siajn unuajn flugojn, per konstruo de monumento al la fratoj Wright. La feston partoprenis la reprezentantoj de Ameriko kaj de Francio.

ĈEĤOSLOVAKIO.

La reveno de T. G. Masaryk. La 21. de decembro festis la bohema ĉefurbo Praha, kaj kune kun ĝi la tuta nacio, la revenon de la kreinto de ĉeĥoslovaka memstaro, prof. T. G. Masaryk. Lia vere triumfa reveno estas la plej grava okazintaĵo en la historio de Ĉeĥoj, ĉar la prezidanto Masaryk estas liberiginto de sia nacio el tricientjara subpremo, kaj la ĉeĥoslovaka memstaro estas ĉefe lia laboro. Kiel forkurinto el la Aŭstria monarkio li dum kvar jaroj faris en fremdlando savigan laboron kaj apenaŭ li revenis, li komencis novan laboron kiel prezidanto de la nova respubliko. Por li tiu ĉi tasko estas ne nur plej alta honorigo de nia nacio, sed eĉ devo eksterordinare malfacila — esti prezidanto de la naskiĝanta ŝtato, kies ekonomia vivo estas tute elĉerpita. La ĉeĥoslovaka nacio esperas, ka ĝi en amika kunlaboro sub gvidado de sia admirinda prezidanto baldaŭ sukcesos transiri en normalan vivon de bone ordigita demokrata ŝtato.

La Germana universitato en Praha. (El »Národní listy«) La germana universitato en Praha timas pro sia ekzisto. La timo havas grandajn okulojn, kaj precipe la timo devenanta el malbona konscienco. Kaj tia estas la germana timo. Dum la milito ili estis helpantoj de multaj kontraŭnaciaj krimoj kaj nun ili timas, ke oni al ili pagos egale. Ili timas senkaŭze. La Ĉeĥa nacio neniam subpremis alian nacion kaj en sia konscienco ĝi havas nenium pekon kontraŭ la humaneco, kontraŭe la homaro eĉ laŭ la fremda atesto, estas ĝia ŝuldanto. Ĝi mezuros juste eĉ al la germana universitato.

La Ĉeĥa nacio volas vivi en paco kun la germanlingvaj civitanoj de sia ŝtato, kaj al ĝiaj kulturaj institucioj ĝi ne kondutos tiel, kiel kondukis Vieno kontraŭ la institucioj ĉeĥaj. Multon oni devos forgesi, sed multon eĉ oferi. Paciĝi kun la novaj internaciaj cirkonstancoj signifas iri novan vojon de amika kunvivo.

Okhora labordaŭro. (El Národní Politika). La 13. de januaro 1919 validiĝos le ĝeĝo el 13. dec. 1918, eldonita sub numero 91 de ĉeĥoslovaka ŝtata leĝaro pri okhora labordaŭro. Neniu ordigita ŝtato en la mondo, krom Aŭstralio, ĝis nun eldonis similan leĝon en tiom granda ĝeneraleco. Sekve ni estas sur la pinto de sociala leĝosistemo. Ĝi signifas plenumon de malnova sociala postulo, kaj en ĉi tiu leĝo oni atentis ne nur la daŭron de la laboro, kaj la laboron »posttempa«, sed per ĝi oni ordigas ankaŭ la laboron dumnoktan eĉ laboron de gejunuloj kaj de la virinoj.

Inter la naciaj ekonomoj kaj socialaj politikistoj ekregis en la demando pri la daŭro de la laboro preskaŭ jam centjara disputo. La laboristaro postulis mallongigon de la labordaŭro en la intereso de sia sano, sia klerigo, kaj ankaŭ tial, ke ĝi povu vivi vivon familian kaj socian, ke ĝi povu partopreni agadon politikan kaj ĝui la vivon laŭ rajto de ĉiu homo. En multaj verkoj pri tiu ĉi afero atestas la laboristaro kaj ĝiaj parolantoj, ke la produktado restos sen malutilo, se la labordaŭro estos mallongita, ĉar plialtiĝos se ne la kvantito de

farita laboro, tiam certe ĝia gvalito, kaj krom tio la ĝusta organizo de la laboro devas scii anstataŭi ĉiun perdon en la homa funkcio. Sed la devizon pri la okhora laboro oni devas bonveni ankaŭ pro tiu kaŭzo, ke oni devos okupi pli da fortoj, kaj tial oni forigos senlaboron kaj malaltigadon de la salaroj...

Kunigo de socialistaj partioj. (El České Slovo). La ekzekutiva komitato de Ĉeĥa socialista partio traktis pri la evoluo de la unuiga problemo kun la bohemslova partio socialdemokrata. La komitato aprobis rezolucion, en kiu oni diras: la ajn meĥanika kunigo de la socialistaj sistemoj ne estas aplikebla. Ni opinias, ke la sola akordiĝa vojo estas tiu, kiu gvidas al klarigo de ĉefaj komunaj socialistaj principoj, tute sufiĉantaj por esti bazo de unuopa politika, eĉ faka organizacio. La ceterajn ideojn malkonsentojn oni solvu interne de la nova partio. — La rezolucio enhavas 8 diversajn punktojn, el kiuj ni citas:

Politikaj kaj fakaj organizaĵoj havas valoron: klasan, truditan al ili per la nuna sociala ordo, ĉar la etikan fundamenton oni povas en la nuna socio, konstruita sur principoj de klasa superregado de unuj kaj klasa subpremo de aliaj, efektiviĝi nur per klasa batalo, kies celo estas forigi la klasajn diferencojn entute. Sekve la klasa batalo signifas por ni nur rimedon por krei ordon neklasan kaj por ekonomia certigo de libereco kaj libera evoluo por ĉiu individuo en la nacio.

Socialistan societon oni ne povas efektiviĝi per iu perforta renverso. La evoluo iras sur laŭleĝa vojo. Senpotenca estas la homa penado, kiu kontraŭstaras ĉi tiun leĝon...

Nia eksterlanda politiko. (El České Slovo). La ĉeĥa eksterlanda politiko, tio estas la rezulto de nia penado doni al la evoluo de niaj interŝtataj rilatoj certan, kristaligitan direkton, dispersigas en analizo de nuntempo en kelkajn elementojn, kiuj sinsekve aperas laŭ siaj efikoj en la influo de tutmonda situacio. Unuavice ĝi estas nia rilato el la okcidentaj regnoj, nia rilato al la problemo orienta kaj fine la persono de la viro, kiu estas destinita komenci la novan vojon de nia eksterlanda politiko. En nia rilato al la okcidentaj regnoj ni sendispute konservos nian fidelecon al niaj ĝisnunaj kunuloj, kiu fondos nian tiel nomatan »tradician politikon«. Kiun vojon sekvos nia politiko estas klare: La ĉeĥa politiko estas kunigita kun la konvenciaj ŝtatoj per ligilo de dankemo, ĝi laboros sub la influo de tradicioj eĉ de la nova politiko de la okcidentaj potencoj kaj en konsekvencoj de ilia mentalo.

Tre sprita.

Lernanto portis botelon da biero hejmen; sed sur la strato li komencis petoli, falis kaj dispecigis la botelon. Kaj li ploris kaj ĝemis. Preterpasanta sinjoro kompatis lin kaj donis al li monon por reaĉeto de botelo kaj biero. La lernanto dankis ĝentile kaj petis la sinjoron pri lia adreso. Kun miro demandis la sinjoro, kial li tion deziras scii. La knabo respondis: »Mi petas, mi demandas nur tial, por scii kien min turni por ricevi monon, se io simila okazus al mi alian fojon. Aka.



DIVERSAĴOJ.



En duan jaron de sia vivo venas La Progreso. Ĝi faras tion kun multe pli bona espero ol antaŭ unu jaro, kiam ni staris preskaŭ sur la ruinoj de ĉeĥa movado esperantista. Dum la pasinta jaro ni sukcesis trovi ŝatindan amikrondon, dank' al kies helpo ni trairis la plej malfacilan periodon. Ni neniam forgesos, la subtenon ne nur de niaj ĉeĥaj fratoj sed eĉ de germanaj, hungaraj kaj polaj samideanoj kaj ni ne dubas, ke nia laboro trovos en la nuna jaro apropon kaj subtenon ankaŭ de allaciaj esperantistoj kun kiuj ni fine povos denove rilatiĝi. Ni esperantistoj jam de longe elĵetis el niaj koroj la naciecan malamon, kaj tial niaj novjaraj salutoj estas direktataj al ĉiuj esperantistoj de la mondo. Ili vivu en paco kaj konkordo!

Tiu ĉi kajero de La Progreso estas duobla. De nun aperados nia gazeto regula la 5. de ĉiu monato. Niaj kunlaborantoj bonvolu sendi siajn artikolojn antaŭ la 1. de ĉiu monato. La tradukantojn de beletriaz artikoloj ni atentigas, ke ni enpresos nur vere valorajn laborojn de famaj aŭtoroj. Alie ni ĉiam preferas artikolojn originalajn. Niaj propagandistoj, eĉ niaj societoj akceptu la devon informi nin rapide pri sia poresperanta laboro kaj pri ĝiaj sukcesoj. La Progreso devas esti vera bildo de ĉeĥoslovaka vivo esperantista kaj tial ĉiu propagandisto devas samtempa esti nia informanto. La informojn oni skribu klare kaj mallonge nur sur unu paĝo de papero. De monato majo translokiĝos nia redakcio en apartan, propran ejon kaj tiam estos eble esti kun ĉiuj niaj informantoj en ofta skriba rilato. Niaj legantoj bonvolu sendi al ni la adresojn de la personoj, al kiuj ni povus sendi la provnumeron de nia gazeto. Ĉiu abonanto sendu al ni sian precizan adreson, ĉar tre ofte la kajeroj estas al ni resendataj pro nesufiĉa adreso.

Konstanta komitato de ĉeĥaj esperantistoj kunvenis vendrede la 17. jan. en kafejo »Unio« en Praha. Ceestis registara konsilanto so. Eiselt, so. dro. Kamaryt, so. lerneja konsilanto dro Rosický, so. Procházka, so. Hromada kaj kiel gasto so. B. Tittl, red. La Progreso. Oni traktis pri la kunigo de la du ĉeĥaj esp. centraj asocioj. Ĉar pro gravaj kauzoj ne estas ankoraŭ eble aranĝi ĝeneralan kunvenon de B. U. E., kiu decidus sian disigon, oni decidis funkcii en la ĝisnuna maniero ankaŭ por proksimaj monatoj, sed la komitato estos kompletigita per ĉeĥaj gvindatoj de ĉeĥa esp. movado. Al la Esp. klubo en Plzeň oni proponis du lokojn en la komitato, sed so. Tittl proklamis, ke la klubo kontentigos kun unu loko, kondiĉe, ke la alia loko apartenos al la laboristaj esperantistoj en Plzeň, kiuj havas tre gravajn meritojn pri nia movado. Tiu ĉi propono estis unuanime akceptita. En la komitaton krom tio oni invitos fraulinon Šupichová, prof. Fridrich el Prostějov kaj MUDron. Schulhof el Pardubice, kiuj estas reprezentantoj de senprofitaj kaj sindona laboro por esperanto. Sekve la Konstanta komitato konsistos

de nun el 11 personoj kaj laŭbezone povas esti kompletigita. Ĉar tiu ĉi organizacio, kies membroj loĝas en diversaj partoj de Ĉeĥoslovakio, tre malofte kunvenos en plena nombro, oni decidis antaŭ ĉiu kunveno informi la membrojn loĝantajn ekster Praha pri la temo de estontaj kunvenoj por tiel al ili ebligi esprimi sian opinion skribe. So. Dro. Kamaryt tralegis la koncepton de la prezentota propono al la ministerio de instruado pri enkonduko de esperanto en mezajn lernejojn de Ĉeĥoslovakio. Post definitiva ellaboro de la propono ĝi estos prezentita al so. ministro Haberman per deputacio konsistanta el soj.: lerneja kons. Dr. Rosický, reg. kons. Eiselt, Dro Kamaryt kaj B. Tittl.

La Komitato de la lingvo internacia, kies celo estas labori por disvastigo de esperanto kaj ĝia enkonduko en lernejojn de Hungara respubliko, kaj informi per ĝi fremdlandon pri la naciaj bezonoj kaj idealoj de Hungario, estis fondita en Budapeŝt. Ĝia prezidanto estas la fama hungara verkisto kaj publicisto Lajos Biró, ĉefsekretario nia konata samidoano Paŭlo Balkanyi. Alie estas en la komitato multaj eminentaj personoj de hungara nacio. Ni deziras al la nova institucio verajn sukcesojn ne nur en ilia poresperanta laboro, sed eĉ en la laboro, kiun ili oferas por la bono de sia nacio. — Adreso de la Komitato estas: Társadalmi muzeum, Budapeŝt VI, Eötvös u. 3. I.

Niaj Vienaj samideanoj ankaŭ preparas proponon pri enkonduko de esperanto en lernejojn. En la komitato, kiu preparas la rilatan memorandon estas soj.: Illing, dir. Kaftan, Schade, dir. Schamanek, Schröder (L. K.) kaj prof. Simon (L. K.). Sinjoro direktoro Schamanek sendis al ni ellaborajon pri enkonduko de esperanto en aŭstriajn lernejojn, kaj pri reformo de lerneja sistemo, kiu efektive bazas sur absolute demokratiaj principoj. Pro ĝia intereso ni enpresos ĝin en la venonta numero.

Konkurso, Ekzamena komisiono de Boh. Asocio Esperantista, volante konstatii la nombron de ĉeĥaj samideanoj kapablaj traduki tekstojn nebeletristikajn, aranĝas konkurson de la plej bona traduko de deklaraĵoj de ĉeĥaj deputitoj en la Viena parlamento el 21. V. 1917 kaj 6. I. 1918. (Enhavitaj en la ĉeĥa broŝuro »Tri projevny ĉes. národa«, eldonita de Kočí en j. 1918). La tradukoj subskribitaj per devizo, akompatanaj per adreso en fermita koverto estas sendotaj ĝis la 15. marto 1919 al dro. Stan. Kamaryt, Vinohrady, Blánická 5. — Tri plej bonaj tradukintoj ricevos 4 jarkolektojn de Bohema Esperantisto, Jazyk všeslovanský a Esperanto kaj Úvahy o jazyku mezinárodním.

Esperanto, la oficiala organo de U. E. A. denove libere eniras en ĉiujn landojn. Ĉar ĝi estas nia plej grava gazeto, ni rekomendas ĝian abonon al ĉiu esperantisto. Ĉar oni ne povas ankoraŭ sendi la monon eksterlanden, oni povas laŭ la interkonsento inter U. E. A. kaj nia administracio, aboni ĝin ĉe ni. Adreso: La Progreso — Plzeň.

Al okhora laboraŭron. En Ĉeĥoslovakio oni lege enkondukis okhoran laboraŭron. Ĉar mankas tie ĉi praktiko, kiel oni povas plej

utile eluzi ĉi tiun tempon, oni petas la legantojn el la lokoj, kie estas okhora labordaŭro enkondukita, sciigi nin, kiel oni dividis la tempon en fako komerca eĉ industria. Oni bonvolu adresi al. Fr. Kavan, Plzeň.

Morto de reformema homo. El Leipzig ni ricevis sciigon, ke tie mortis post ne longa malsano je pneŭmonio s—o. Fritz Stephan, kiu antaŭ kelkaj jaroj transiris al erara vojo de reformismo. Sub pseŭdonimo Dr. Stelzner li tiam »reformis« Esperanton, kaj li komencis tuj propagandi sian »reformajon«. En tiu rolo havas kun li niaj Saksiaj samideanoj tre malbonajn spertojn, ĉar liaj propagandaj rimedoj ne estis ĉiam ne riproĉindaj. Sed pro ili ni silentos, ĉar pri mortinto ni ne parolu malbone. Li ripozu trankvile en la tero!

KRONIKO.

Praha. Bohema societo esperantista aranĝis la 28. jan. en sia klubejo, restoracio de so. Hoza sian generalan kunvenon. — Rondeto de esperantistinoj (pli frue Fraŭlina rondeto) fondiĝis la 7. jan. en Praha. Elektita estraro: instruistino J. Šupichová (prezidantino), instr. M. Moudrá (vicprez.); ofiĉistino S. Dlouhá (sekret), L. Plzeňská (kasistino), instr. J. Čiškova (bibliot.), L. Dandová (revuist.), instr. Hlaváčová (aranĝantino de amuzoj) kaj A. Zaludová. La nove fondita Rondeto celas esti neutrala centro de ĉiuj ĉefaj esperantistinoj, kiu volas serioze propagandi niajn lingvon kaj ideon. Korespondantojn oni sendu al sekret. F—ino. Sidonie Dlouhá, Praha 15, Wilsonovo nádraží. — La rondeto malfermis sabate la 18. jan. en Ženský klub (Jáma 5) kurson de esperanto, kiu estis komencita per parolado de F—ino Šupichová »Pri graveco de la lingvo internacia«.

Plzeň. Esperantista klubo aranĝis 25. de januaro sian XIV. jaran kunvenon, kiu elektis jenan komitaton: S—oj. Ing. Rud. Novák, ĉefo de la urba elektrejo (prezidanto), Jos. Horák, milit. kapelestro (vicprez.), Em. Kubásek (sekretario), Inc. Gross (kasisto), Al. Loukota (bibliot.), F. Kavan (protokol.), J. Brožík (arĥivisto), Bed. Tittl (revuisto). S—o. Tittl eksigis el sia longjara posteno de sekretario, por havi le eblon dediĉi sin plene al la redaktado de La Progreso. Por reprezenti klubon en la Konstanta komitato oni elektis s—on. Tittl. — Ĉe la klubo oni fondis »Instruan fakon« (s—oj. Gross, Loukota, Brožík), kiu zorgos pri la programoj de la ĉiusabataj kunvenoj. La programo por februaro: 1. Parolado de B. Tittl: Nuna stato de esperantismo. 8. Vespero de humorajoj. 15. Libera konversacio. 22. Fakaj esprimoj kaj vortoj kunmetitaj en esperanto. (Instruo de B. Tittl). — La Popola universitato en Plzeň aranĝas sub la inspekto de Esp. Kl. vesperajn kursojn de esp. en kiuj instruas so. J. Balvín. Kursa kotizo 26 K.

Doubravka ap. Plzeň. Labor. turistoj malfermis kurson por 37 personoj. Instruas so J. Pechl.

Budějovice. La 18. jan. komencis kurso de la Esper. Klubo, en kiu instruas so. F. Svač

na. Per ĝi komenciĝas nova laboro, kiu estis antaŭ la milito en tiu ĉi urbo eksterordinare vigla.

Moravia laboro por esperanto. De tiu tempo, kiam liberigis nia vivo politika, reviviĝis ankaŭ nia movado en Moravio. Grandan meriton pri tio ĉi oni ŝuldas al frl. Janalíková el Bystřice p. H., kiu fervore kaj tre sukcese propagandas Esperanton en la regionaj organizacioj de geinstruistoj, kiuj nun multope postulas enkondukon de Esperanto en la instru-an planon por lernejoj popolaj kaj burĝaj — laŭ similaj postuloj de niaj samideanoj en Anglujo. Krom tio aranĝas frl. Janalíková kun sia koleginino Mináříková en Bystřice p. H. 2 esper. kursojn por la publiko kaj por gelernantoj aparte. Ambaŭ kursoj havas ĉirkaŭ 100 vizitantoj. — Novaj kursoj estos tuj aranĝataj ankaŭ en Val. Mezříčfí (so. instruisto Šembera, por Sokolaj), Vizovice (frl. Čejkova kaj sro. Sehnal), Holešov (frl. Janalíková). — Sro. Kessler laboras fervore en Zlín, kie li faras esper. kurson por pli ol 100 geoficistoj de fame konata firmo T. A. Baťa. La propagando de sro. Kessler sukcesas bonege, ĉar li mem spertis dum la milito, kiel utila estis por li Esperanto dum lia senvola, sed per la milito trudita al li vojaĝo preskaŭ ĉirkaŭ la mondo. Th.

Olomouc. E. kursojn perfektigajn gvidas sroj. Murath kaj Kudela. La lasta instruas ankaŭ kelkajn personojn pri E. private. Post longa paŭzo oni, denove kunvenis la 16. de januaro en kafejo Paříž, kiun oni elektis por konstanta kunveno. La kunveno okazos ĉiun 2. jaŭdon ja la 8. vesperé. Oni diskutis fondon de societo de E. instruistoj en Ĉeĥoslovakio sen diferenco de nacieco por komune postuli la enkondukon de E. en lernejojn. Aligajn akceptas sro. Albin Neužil, lernejestro en Neředín u Olomouce.

Hodolany u Olomouce. Sro. Horák poŝta ĉefkontroloro malfermis en decembro E. kurson, kiun partoprenas pli ol 50 personoj.

Velvary. Danke al laboro de s—o. JUC. Fiala oni sukcesis fondi tie ĉi Esp. Grupon.

Wien. Esp. societo »Danubio«. Je la 25a festis la membroj en la kafejo Kraus la kristnaskon ĉe gaja amuzado. Je la 1. de Jan. estis aranĝita pli granda Novjara amuzado en kafejo Schoenbrun, ĉeestis pli ol 150 personoj, gesamideanoj kaj gastoj. Post saluta parolo de s. pr. Kaftan sekvis longa amuza programo. Al la klopodoj de f—inoj S. Braun, M. Schicketanz, G. Wildmann, s—roj. E. Braun, H. Strejček (membroj), kaj al aliaj klubanoj kaj gastoj (s—roj O. Wildmann kaj Sprinzel) oni dankas la sukcesplenan prosperon de la festo. — La societo intencas kunmeti adresaron por la fondota Viena Esper. hejmo de germanaŭstria esperantistoj. Samideanoj el germanaŭstrio estas petatoj sendi sian adreson al la sekretario s—o. R. A. Čech, Wien IX./1., D'Orsayg. 7/23. — La amuza komitato de la societo aranĝos la 23. febr. en la kafejo »Stadttheater« amuzan vesperon.

Eraro estas despli danĝera, ju pli da vero ĝi enhavas. Amiel.

J. Šupichová:

ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

5a fragmento (el »Verkaro de Zamenhof«).

El parolado de Dro L. L. Zamenhof en Va kongreso en Barcelona 1909:

»... Vi scias, kia estas nia celo; vi scias, kia estas la sola vojo, per kiu ni povas atingi tiun celon; ni marŝu do antaŭen diligente kaj harmonie. Se ni demando nin, kion ni faris, en la ĵus finiĝinta interkongresa jaro, ni povos respondi: »Ni same vivis, ni kreskis, ni fortigiĝis en ĉiuj rilatoj.« Kian grandan signifon tio havas, tion povas kompreni nur tiuj, kiuj komprenas la tutan gravecon kaj malfacilecon de nia afero, kaj kiuj mem laboris por ĝi... «

Přeložte:

1. Chtějme dojíti svého cíle a nebojme se překážek. — 2. Jen společnou a svornou prací zvítězíme. — 3. Při posuzování jiných (posuzující jiné) ptejme se samy sebe, co jsme vykonali? — 4. Snažme se všemožně, aby naše hnutí mohutnělo. — 5. O významu propagační práce nikdy nepochybujme. — 6. Pracujíce pro Esperanto, zlepšujeme osud náš i budoucích.

PROVERBOJ.

Trad. »Fraulina rondeto« en Praha.

Kiu trinkas je sano de ĉiu, tiu la propran droniĝas. Laton sur laton oni alnajas kaj bieron trinkas. La pli multo droniĝas pli ofte en glaso da biero ol en la rivero.

Ĉie bone — hejme plej bone.

Kiu hejme ĝojon ne trovas, aliloke ĝin vane serĉas.

Laŭdu la fremdlandon, sed restu hejme!

Kie oni naskiĝas, tien oni taŭgas.

Pli bone hejme nur pantranĉaĵon, ol tuŝan bovinon en fremdlando.

Manĝu hejme kion vi havas kaj en fremdlando kion oni donas al vi.

Honoru la fremdujon, amu la patrujon!

Kiu hontas pro sia gepatra lingvo, tiu indas mallaŭdon de ĉiuj homoj.

ALVOKO.

Fremdlandaj samideanoj, kiuj nepovas aboni La Progreson senpere ĉe nia administracio, ĉar la poŝto ne akceptas la poŝtmandatojn por Ĉeĥoslovakio, bonvolu aboni ĉe so. Svithert Degenkamp, delegito de U. E. A. en Utrecht, Bethlehemweg 36, (Nederlando), kiu estas nia reprezentanto por fremdlando. Ankaŭ oni povas

aboni La Progreson ĉe la administrejo de Esperanto, Genève, 10, rue de la Bourse (Svicio).

Komuniko.

Esperantista klubo en Plzeň, kiel provizora eldonanto de »La Progreso«, konsiderinte, ke pro diversaj kaŭzoj ne efektiviĝis dum la pasinta jaro la plano fondi presan societeton, kiu estus posedanto kaj definitiva eldonanto de »La Progreso« decidiĝis dum sia XIV. ĝenerala kunveno, okazinta la 25. jan. t. j. je

likvidacio

de pagitaj akcioj por »La Progreso«. Tial oni petas la pagintojn sciigi la administracion de »La Progreso«, ĉu ili deziras la resendon de la mono, aŭ ĉu ili destinas ĝin por la presa fondaĵo de »La Progreso«. Ĉiu akciulo, kiu ne anoncos sian decidon ĝis la 30. aprilo 1949, perdos post tiu ĉi limtempo le rajton disponi per la de li pagita sumo,

Esperantista Klubo en Plzeň.

Ing. R. Novák v. r.
t. t. prezidanto

Em. Kubásek v. r.
t. t. sekretario.

K. HORKÝ:

Novedzo.

En la naĝejo de Žofín banis kun ni juna ingeniero, kiu edziĝis antaŭ du monatoj. Li havis korpon blankan, allogan, muskolan kaj rondan cikatron sub la kolo.

»Kio al vi fariĝis, sinjoro ingeniero?« demandis konatuloj, kaj li respondadis mallaŭte, kun signifoplena ekrido: »Aĥ... malfeliĉo... komprenu... komprenu... la unuan nokton... ĥa ĥa... mordis min edzineto... «

Kaj tio ripetigiĝis ĉiun tagon. Konatuloj demandis pri la ronda cikatro kaj li respondadis dolĉe, mallaŭte, kun signifa ekrido: »Ĥa ĥa... la unuan nokton... komprenu... mordis min edzineto... «

Kaj neniu sin trovis, min ne esceptante, kiu alsaltus kaj vangofrapus tiun homon, kiu kun diskreteco de bandito publike montradis en naĝejo la kopion de dentoj de sia edzino.

Trad. arcĉ. C. Nebuška.

NOKTO KAJ SUNO.

Nokto, vekiginta je la unua ekbrilo de l' eliranta suno diris ĉagrene al la suno: »Kial vi vekas min el la dolĉa dormado kaj ne donas al mi la bezonatan ripozon?«

Ekridetis la ora suneto kaj trankvile respondis: »Via rajto kaj povo estas jam finiĝintaj, mia rajto kaj povo komencas. Tiel ordonas leĝoj de l' naturo, ribeliĝi kontraŭ ili estus nur vanaĵo.«

Kaj tuj malaperis rapide la nokto, kaj agrabla suneto disfluigis siajn orajn radiojn sur la vastan ĉirkaŭaĵon.

Esp. Marie Kubásková.

Ŝtata fremdula kancelario

(Státní cizinecká kancelář), Praha II., Voršilská 1.

petas esper. societojn en Ĉeĥoslovakio helpi al ĝi en propagandaj aferoj. Aliĝu tuj kaj sciigu la adresojn de ĉefaj komitatmembroj kaj daton de la kunvenoj. (Oficiala sciigo.)

PAPERON

pogrande eksterlanden eksportas


La Progreso - Plzeň.



Importon kaj eksporton de ĉiuj komercaĵoj

prizorgas

La Progreso - Plzeň.



La redakcio de La Progreso serĉas ĉiulandajn

raportistojn

pri politika, nacia, ekonomia kaj sociala stato de ilia lando. Kapablaj gesinjoroj aliĝu ĉe la redakcio.

Kapabla

komercisto

serĉas reprezentadon de bohemiaj fabrikoj

porcelano k. s. por eksporto al Italio.

Proponojn oni sendu al la administracio de La Progreso, Plzeň.

Abonu

kaj vastigu gazeton

»La Progreso«

!!!

BOHEMA

ESPERANTO-SERVO

(ing. L. Berger)

Moravany apud Pardubice, Bohemujo.

Ĝi peras korespondadon, informas pri esp. movado, pri bohema nacio, prizorgas kaj korektas tradukojn, aranĝas paroladojn, kursojn, instruas persone eĉ skribe, vendas esperantajn librojn, glumarkojn, signojn, Mateon.

»LA PAROLE«

Tchécoslovaque à l'Étranger.

Renseignements politiques, littéraires, artistiques, économiques. — Journal hebdomadaire publiant aussi des articles anglais, espagnols etc.

Le numéro 40 hellers.

Administración et Rédaction Praha-II.,
Václavské náměstí 42.



Ĉeĥoslovaka ŝtata oficejo por fremduloj

Československý cizinecký úřad.

Le bureau officiel Tchécoslovaque des
étrangers.

Praha-II., Voršilská 1.

Donas informojn pri ĉeĥoslovakaj aferoj.
Ĉeĥe, france, angle, itale, esperante.



MATEO,

alie nomata paragvaja teo estas la sola efektive valora anstataŭaĵo por kafe kaj fina teo. Ĝi enhavas 1% da kofeino, efikas refreŝige et kurace. Pura naturaĵo antaŭ la milito rekte importata el Ameriko pere de Esperanto.

Tre taŭga por ĉiutaga trinkado.

Paketojn po 3.— K poŝte ĉien ekspedas kaj pli detalajn klarigojn donas

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

(inž. L. Berger), Moravany, Bohemujo.



Novaj esperantaj signoj

simplaj, sed tre elegantaj, pingle aŭ broĉe aranĝitaj, en kvinangula formo, estas aĉe teblaj ĉe

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

Moravany, Bohemujo.

1 peco 2 K, poŝte K 2.40; 10 pecoj K 18.—
100 pecoj K 160.— afrank.



Se vi deziras havi bonegan internacian gazeton,
abonu :

»ESPERANTO«

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.
MONATA GAZETO REDAKTATA TUTE EN ESPERANTO.

16—20 paĝoj de plej bona teksto.

En ĉi tiu: Artikoloj de ĝenerala intereso pri internaciaj problemoj, socialaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literaturaĵoj. — Esperantismo. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Lingvaj studoj. — Anoncetoj.

Jara abono: 12 kronoj, Luksa eldono: 14 kronoj, pageblaj al administrado de „La Progreso“ en Plzeň, aŭ Sro. Dro. Sós, Tuchlauben 18., Wien.

Senpaga **specimeno** laŭ peto de la administrejo:

10. rue de la Bourse, Genève (Svisio).

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.